

la naska fasko

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero dek kvar
2009-07-16
ĵaŭdo

Kio okazos hodiaŭ?

★ 3:00 ptm: tabuloludoj

Kiel: komuna salono en Cuzco

Ni provos la lingvoludojn *Akordoj* (adaptita de la anglalingva ludo *Apples to Apples*) kaj *Vorto-Mozaiko*. Ĉu vi havas tabuloludon kun vi? Kunportu ĝin!

★ 7:00 ptm: diplom-ceremonio

Kie: AP&M 4301

★ Post la diplomceremonio: Festo!

Kie: komuna salono en Cuzco

Limeriko de falsaj amikoj, Partoj V–VII

de Anonimulo

La cinika kontoro

Havas “adapto-divizon”

Pri la “malmasiva gimnazio”

En kiu multe de la polucio

Venas akurate de la fantoma rostro.

Estos strangaj seancoj

Kie la angoraj grekoj

Kontrolos la medion esperante praktiki

La planon difekti

La gimnazion de la vulpoj.

La argumento de la gubernistoj

Selektas malmultajn de la mukozoj

Nur tiel verdajn, ke aliaj ne povas ilin kopii

Sed facile disponi

En la akvo sub la pramoj.

Abeloj abundas

de Doroteo HOLLAND

Abeloj abundas

inter floretoj...

Serĉe profundas

Kun zumaj ridetoj

Bileto-klarigo: la bankbi-

leto kiu aperis en la 12-a

Fasko estas nur unu el

multaj proponitaj artaĵoj en

konkurso de la Svisa Nacia

Banko. La jena bildo mon-

tras la veran 50-CHF-bile-

ton kiu ekcirkulos en 2010.

Ĝi baziĝas sur koncepto de

Manuela PFRUNDER. Dankon

al Uwe por la informo!



Pri foriraj planoj:

Rendevuu kun Reni por sabata

ŝoforado: Sabaton matene post matenmanĝo, Reni ekiros norden en sia aŭto, kiu havos spacon por unu aŭ du kunvojaĝantoj. Se vi deziras veturi kun Reni, kontaktu lin aŭ persone, aŭ rete ĉe <Rennyporter@gmail.com>.

Busetoj al la flughaveno: Oni povas mendi buseton al la flughaveno de la retejo por la servo *Cloud 9 Shuttle* ĉe <<http://supershuttle.com>>. Se vi bezonas helpon pri rezervoj, kontaktu al Ellen.

La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo

de Bernhard TUIDER

Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrujo, estas konata interalie pro sia “muzea pejzaĝo”. Unu el la plej unikaj muzeoj en Vieno estas la Esperantomuzeo, parto de la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La muzeo estis fondita en la jaro 1927 de s-ro Hugo STEINER kiel “Internacia Esperanto Muzeo” kaj apartenas ekde la jaro 1928 al la Aŭstria Nacia Biblioteko. Dum la 20-a jarcento la Kolekto fariĝis tutmonde la plej ampleksa fakbiblioteko por Esperanto kaj Interlingvistiko.

Principe, la instituto kolektas materialojn pri ĉiuj planlingvoj. Nuntempe la Kolekto por Planlingvoj enhavas dokumentojn pri pli ol 500 planlingvoj, kaj la plej granda parto de la havaĵo koncernas Esperanton. Proksimume la havaĵo entenas: 35000

librojn kaj broŝurojn, 2500 titolojn da gazetoj kaj revuoj, 3000 muzeajn objektojn, 2000 aŭtografojn kaj manuskriptojn, 23000 fotojn, 1100 afiŝojn kaj 40000 flugfoliojn.

Du plej gravaj katalogoj de la Kolekto estas **Trovanto** kaj **Bildarchiv Austria**. *Trovanto* estas la elektronika katalogo por la libroj, broŝuroj, revuoj, manuskriptoj kaj muzikaĵoj. Ĝi estas konsultebla per Interreto kaj en la germana kaj en Esperanto. *Bildarchiv Austria* enhavas fotojn kaj alian bildmaterialon, same objektojn kiel insignojn, ktp.

Enkadre de la ciferecaj projektoj iom post iom la biblioteko skanas aŭ fotas la sekvajn dokumentojn kaj metas ilin en la Interreton:

- Esperanto-librojn kaj broŝurojn ĝis 1945
- Esperanto-revuojn ĝis 1945
- milionojn da fotoj
- la 3000 muzeajn objektojn, i.a. insignojn, glumarkojn, poŝtmarkojn ktp.

Ĝenerale la ciferecaj materialoj estas elŝuteblaj kaj elprinteblaj. Aliro kaj pliaj informoj troviĝas en la hejmpaĝo de la Kolekto por Planlingvoj.

- **Adreso:**
Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-muzeo
Palais Mollard-Clary
Herrengasse 9
- **Poŝta adreso:**
Josefsplatz 1, 1015 Wien, Postfach 308
- **Retadreso:** **esperanto@onb.ac.at**
- **Retpaĝo de la Kolekto por Planlingvoj:**
<http://onb.ac.at/sammlungen/plansprachen.htm>
- **Retpaĝo de la Esperantomuzeo:**
<http://onb.ac.at/esperantomuseum.htm>
- **Retpaĝo de la Aŭstria Nacia Biblioteko:**
<http://onb.ac.at>



Unu el la multaj fotoj en la muzea kolekto

“Falsaj amikoj” kaj kvazaŭ-afiksaj malamikoj

de Ron GLOSSOP

Mi supozas ke preskaŭ ĉiuj angla-parolantaj esperantistoj konscias ke ekzistas “falsaj amikoj” por angla-parolantoj. Ekzemple, la vorto *atendi* ne signifas la vorton *ĉeesti*.

Sed eble nov-bakitaj esperantistoj nur komencis konstati ke ankaŭ ekzistas multaj “kvazaŭ-afiksaj malamikoj”, kiuj povas trompi komencantojn, aparte ne-eŭropanojn. Ekzemple, la vorto *malario* ne signifas “mal-ario”, kaj la vorto *maleolo* ne signifas “mal-eolo”. Plue la vorto *mandolino* ne signifas la koncepton “mandol-ino” kaj la vorto *bisino* ne signifas la koncepton “bis-ino,” kaj la vorto *vazalino* ne signifas la koncepton “vazal-ino.” Denove plue la vorto *mandrilo* ne signifas la koncepton “mandr-ilo,” kaj la vorto *strobilo* ne signifas la koncepton “strob-ilo.” Denove plue la vorto *kalkano* ne signifas la koncepton “kalk-ano” kaj la vorto *banano* ne signifas la koncepton “ban-ano.” Denove plue la vorto *betulo* ne signifas la koncepton “bet-ulo” kaj la vorto *angulo* ne signifas la koncepton “ang-ulo”. Vi certe povas aldoni pliajn ekzemplojn.

Tamen la sistemo de afiksoj estas unu el la plej gravaj partoj de Esperanto kaj multe plifaciligas la lernadon de la lingvo, aparte por eŭropanoj.

Nova tradukado

de Koto FARMER

Mi ĵus eksciis iomete pri nova esperanta traduklaboro kiam mi retumis al la retpaĝaro <<http://hesperian.org>>.



Hesperian Books eldonas librojn (ĉefe en la angla kaj la hispana, sed ankaŭ en aliaj lingvoj), kiuj ĉiam uzas simplajn vortojn kaj bildojn. La libroj prezentas tre gravan informon pri sano, pri la purigo de loka akvo, kaj tiel plu. Tiu informo valoregas por multaj ordinaraj homoj, kiuj alfrontas ĉiutage aĉajn vivkondiĉojn.

Kiam mi iris al la paĝo, kiu montras la liston de lingvoj, mi trovis “Esperanto”! Kiam mi klakis tie, mi trovis la nomon de esperantisto kiu loĝas en Svislando kaj tradukas la libron *Kie ne estas kuracisto* (angle: *Where There Are No Doctors*).

La Fonduso Hesperian kuraĝigas la tradukadon de siaj libroj, kaj la libroj estas elŝuteblaj senpage el la retpaĝaro.

Se pli da tiaj libroj haveblus Esperante, ĉu pli da homoj lernus Esperanton, anstataŭ la anglan, por plifacile gajni kaj disdoni la informan valoregan?

La Nord-Amerika Somera Kursaro de 2009 baldaŭ finiĝos! Morgaŭ matene aperos la fina numero de *la NASKa Fasko* de NASK 2009. Se vi havas lastminutajn kontribuojn, rapidiĝu kaj portu ilin tuj al la redaktisto en *Asante* #127, aŭ (prefere) sendu vian majstroverkojn rete al <nask.esperanto@gmail.com>.

Adiaŭaj vortoj

tradukis el la hebrea Shai MOR

Shai enesperantigis la suban tekston el la hebrea lingvo. Ĝi estas sintezo de partoj el du hebreaj kantoj pri la rakonto La Eta Princo de Antoine de SAINT-EXUPÉRY.

Mi renkontis lin meze de la dezerto.
Bela estas la sunsubiro al malfeliĉa koro.
La eta princo ne pli vidos ŝafidinon kiu manĝas floron.
Lia steleto malleviĝas, ĝi sinkas malsupre de la horizonto.
kaj li adiaŭas min per tiuj vortoj:
“Tiu ĉi estas mia lasta somero kun vi,
je la unua pluvo mi malaperos.
malrapide, malrapide la larmoj falas,
vole-nevole la vivo daŭras.
Memoru min afable kiam vi kuniĝos, ĉar mi ne ĉeestos.
Memoru ke vi promesis ne plori
ĉar la ĉieloj estas grandaj kaj la larmoj etaj.
fermu viajn okulojn je la unua malsuprenverŝaĵo kaj pensu, pri mi.”



Poemo de Sulpicia

tradukis el Latino Neal WILEY

Tiun ĉi poemon verkis Sulpicia, unu el la du konataj romiaj poetinoj (kaj la sola kies poemoj transvivis la jarmilojn ĝis nun) kaj nevino de Marcus Valerius Messalla Corvinus, grava romia generalo. Ŝi vivis dum la lastaj jardekoj de la unu jarcento antaŭ Kristo, kaj ni scias preskaŭ nenion pri ŝi, krom tiu ĉi informo. Ekzistas ses poemoj entute, el kiuj ĉi tiu estas la sesa. Ŝiaj poemoj transvivis kun tiuj de la pli fama poeto Albius Tibullus, kies patrono estis ŝia onklo Messalla.

Por ke mi ne estu doloro tiel sovaĝa por vi, mia lumo, kiel mi ŝajnis esti dum la pasintaj kelkaj tagoj, mi konfesas ke mi prihontas nenion ajn kion mi faris dum mia stulta juneco pli ol lasi vin sola hieraŭ nokte, ardanta mian flamon kaŝi.

(Corpus Tibullianum III.18)

Praesperanto enesperanigita

Jen la praesperanta teksto el la hieraŭa artikolo de Neal, kune kun ĝia traduko en Esperanton:

La redziĝaŭ está ba sa balko, de kvu so potá vidi ful, kvul so amá. Ro vionu del perkalaj guroj, e está bella e amiza. Kor so ne jam habá la krono, ro ne sol amá.

La reĝido estis sur sia balkono, de kiu ŝi povis vidi tiun, kiun ŝi amis. Li venis de la varmegaj landoj, kaj estis bela kaj amplena. Ĉar ŝi ne jam havis la kronon, li ne ŝin amis.